Leden, Únor — Januaro, Februaro, 1904. Nro 1–2.

ROČNÍK II
JARO II

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření pomocného jazyka mezinárodního

ORGÁN
»Rakouského spolku Esperantistů« v Brně a »Klubu Esperantistů« v Praze.

ORGANO
de »Aŭstria societo Esperantista« en Brno kaj de »Klubo Esperantista« en Praha.

Redaktor české části:
KRUMPHOLC JOS.

Redaktoro
de l' parto Esperanta:
ČEJKA TH.

OBSAH:
ENHAVO:

Redakcio & administracio:
BYSTŘICE-HOSTÝN
Moravio. Aŭstrio.

Roční předplatné 3 K.
Jara abono 3·50 fr.

Číslo po 40 h.
Nro po 45 cent.

Členové spolku Brněnského i klubu Pražského dostávají »Č. E.« zdarma.

Jak založiti kroužek esperantský?

Stanovy „Spolku Esperantistů v Brně (Frant. Jos. tř. č. 102) v § 16. praví:

„Je-li v některém místě nejméně 10 esperantistů, lze tam (se zřetelem na spolkový zákon) založiti místní skupinu. Rovněž členové několika sousedních míst mohou utvořiti skupinu. Příslušnost ke skupině jest podmíněna členstvím v ústředním spolku.

Každá místní skupina volí pět členů do představenstva skupiny; tito volí ze svého středu předsedu, jednatele, pokladníka a rozdělí ostatní správní práce mezi sebe.

Představenstvo schází se nejméně jednou za měsíc a jest usnášení schopno, jsou-li jeho tři členové přítomni."

O dalším jednání viz stanovy, jež spolek na požádání každému ochotně zašle zdarma. Jen na uhražení poštovného budiž přiložena 5h známka nebo korresp. lístek (nejlépe psáti na lístku s odpovědí).

Českou učebnici Esperanta (mluvnici, cvičebnici, čítanku) se slovníky esper.-čes. a česko-esper. lze objednati v administraci „Českého Esperantisty" (BYSTŘICE-HOSTÝN, Morava) nebo prostřednictvím každého knihkupectví. Cena knihy neváz. K 2·10, váz. K 3·10. Vázané výtisky lze obdržeti pouze v administraci „Č. E."

Propaganda. K informačním účelům hodí se velmi dobře obsažný spisek „Idea řeči mezinárodní", jehož 1 výtisk prodává se za 13 h, 5 výtisků za 60 h a 10 výtisků za 1 K (vždy vyplaceně). — Propagační letáky (stručná mluvnice, ukázky Esperanta, úsudky slavných mužů o idei pomocného jazyka mezinárodního vůbec a o Esperantu zvláště). 10 kusů obdrží každý zdarma, kdo o ně dopíše dvojitým korresp. lístkem. 25 kusů za 10 h. Objednávky vyřizuje obratem pošty administrace „Č. E.".

Žádáme všech přátel, aby nám laskavě oznámili adresy, na něž bychom mohli úspěšně zaslati ukázková čísla našeho listu.

ESPERANTSKÉ ČASOPISY

„Lingvo Internacia" (ročně 3·80 K, s literární přílohou 6·30 K), „Scienca Revuo" (7 fr.), „La Lumo" (3 fr.), „The Esperantist" (4 fr.), „La Belga Sonorilo" (4 fr.), „Rondiranto" (4 fr.) - - - - -

lze předplatiti prostřednictvím administrace »Českého Esperantisty« (ušetří se na poštovném).

Zaslal jsem již doplatek za rok 1903 a předplatné — 3 K — na rok 1904?

NA PRAHU ROČNÍKU II.

Minul prvý a, doufejme, nejtěžší rok boje našeho o život . . .

S rokem novým chystáme se i k životu novému, lepšímu. Chceme především více než loni hleděti si článků učebních a cvičebních a budeme i více přinášeti článků dvoujazyčných. Kronika, již povede p. Jos. Grňa v Lipové u Dřevohostic (Morava), jemuž přímo zasílány buďtež tedy příspěvky pro ni určené, bude letos obsáhlejší a také dvoujazyčná, aby i ti, kdož neznají esperantsky, mohli se dovídati o pokrocích věci naší; tím bude i usnadněno získávání nových stoupenců idei naší.

Pasis la unua kaj, ni esperu, ke la plej malfacila jaro de nia batalo por la vivo. En la komenciĝanta jaro ni dediĉos pli da zorgo al artikoloj lernaj kaj ekzercaj kaj publikigados pli da artikoloj dulingvaj. La kroniko estos pli ampleksa kaj dulingva, por ke eĉ tiuj, kiuj ne scias Esperanton, povu ekscii pri progresoj de nia afero; tio al niaj amikoj plifaciligos gajni novajn adeptojn. La kronikon gvidos de nun s-o Jos. Grňa en Lipová-Dřevohostice (Moravio), al kiu oni sendadu rekte ĉion por ĝi difinitan.

La redakcio.

LETERO DE D^RO^ ZAMENHOF.

Adresita al s-o M. Seynaeve kaj presita laŭ speciala permeso.[1]

Vian ideon pri la aranĝo de internacia kongreso de esperantistoj mi trovas tute bona. Sed, por ke la kongreso donu al nia afero ne malutilon sed nur utilon, ĝi devas esti aranĝita laŭ la sekvantaj principoj:

---

[1] »Letero« estis publikigita unue en la januara Nro de la franca organo »L' Espérantiste« (jaro VII, 1904, Nro 1.)

La redakcio.

1. Ĝi devas esti bone kaj zorge aranĝita, havi multe da partoprenantoj kaj havi la karakteron de granda, solena kaj imponanta festo de internacia frateco, por ke la gazetoj multe parolu pri ĝi kaj ke ĝi estu plena de entuziasmo kaj veku en la tuta mondo entuziasmon kaj deziron aliĝi al ni. Krom paroloj oni devas aranĝi komunajn kantojn en Esperanto, eble eĉ ian internacian ludon aŭ publikan konkurson; oni devas aranĝi en ia granda teatro prezentadon de dramo en Esperanto. Oni devas antaŭe eksciti la interesiĝon de la tuta urbo, por ke al ĉiuj festoj de la kongreso venu grandega multo da gastoj neesperantistoj; — per unu vorto, ni devas fari grandan impreson kaj devigi la tutan mondon paroli pri la kongreso.

2. En la kongreso oni devas paroli pri organizado de nia afero, reciproka helpo en la batalado, pri rimedoj de propagando, pri kreado de granda kaj utila literaturo, k. t. p.; sed nenion, absolute nenion oni devas paroli pri ŝanĝoj aŭ plibonigoj! Por ke nia lingvo atingu sian celon kaj ne disfalu kiel Volapük, ĝi devas resti por ni absolute netuŝebla, tiel same kiel ĉiu alia lingvo, en kiu nenia persono ja kuraĝus proponi iajn reformojn, kvankam ĉiu el tiuj lingvoj estas multe malpli perfekta ol nia.

Nun al la demando pri Akademio. Jam tre longe mi pensas pri aranĝo de ia konstanta »Centra Komitato«, kiu prezentus per si la plej altan aŭtoritaton en nia afero kaj kiu sola havus la rajton solvadi ĉiujn dubojn, kiuj aperas en nia afero. Sed la komitato devos decidadi nur pri demandoj dubaj; fari iajn ŝanĝojn en la lingvo la komitato ne havos la rajton. Kun la aranĝo de tia »Centra Komitato« oni devas esti tre singarda, por ne fari ian danĝeran paŝon; tial mi nun publike ankoraŭ nenion parolas pri tio ĉi, sed mi konsiliĝados pri ĝi private kun diversaj amikoj. Kiam la plano post matura pripenso montriĝos bona, tiam mi proponos al la esperantistoj efektivigi tiun planon.

Sed ĉu »Centra Komitato« estos fondita aŭ ne — tiu ĉi demando tute ne devas maltrankviligi niajn amikojn. Ĉiaj paroloj pri reformoj aŭ plibonigoj tute ne devas vin maltrankviligi, ĉar ili havas nenian celon nek estontecon. Ĉu »Centra Komitato« estos fondita aŭ ne, — unu principo staras kaj devas stari tute forte, kaj la tuta mondo espe-

rantista en la nuna tempo komprenas ĝin tre bone kaj certe batalos unuanime kontraŭ ĉiu ektuŝo de tiu principo; tiu ĉi principo estas: simile al ĉiu alia lingvo Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo *finita* kaj *netuŝebla*. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam, kiam nia lingvo estos jam oficiale akceptita en la tuta mondo. Ĝis tiu tempo la netuŝebleco de la lingvo estas la plej fundamenta kondiĉo por nia progresado.

Mi parolas tion ĉi ne kiel aŭtoro de la lingvo, sed kiel simpla esperantisto, kiu ne deziras, ke nia afero disfalu, kiel la afero de Volapük.*

Mia opinio ne estas sekreta. Se vi deziras, vi povas publikigi mian leteron.

* Kiel aŭtoro de la lingvo, mi pli ol ĉiu alia volus, ke ĝi estu kiel eble plej perfekta; por mi la reteniĝado de plibonigoj estas pli malfacila ol por ĉiu alia; kaj mi eĉ konfesas, ke kelkajn fojojn mi jam estis preta proponi al la esperantistoj kelkajn malgrandajn plibonigojn; sed ĝustatempe mi ekmemoradis pri la granda danĝereco de tia paŝo kaj mi forĵetadis mian intencon.

Via *L. Zamenhof.*

POMOCNÝ JAZYK MEZINÁRODNÍ.[1]

Francouzsky napsal univers. prof. Dr. *L. Couturat* — přel. *J. F. Khun.*

LATINA JAKO JAZYK MEZINÁRODNÍ.

První rozluštění, které se učencům a především jazykozpytcům a dějepiscům nabízí, záleží v tom, aby se přijala latina, která již kdysi byla universálním (obecným) jazykem učeného světa.[2] Ale latině se především činí výtky, které jsme již dříve kladli jazyku učenců vůbec. Nelze dosti často opakovati, že jazyk mezinárodní není určen výhradně jen pro učence; má býti přístupným každému člověku se středním vzděláním, zvláště však těm, kdo znají jen svůj jazyk mateřský, mužům i ženám. Musí tedy býti možno, aby se mu každý naučil sám, bez učitele. Ale latina nevyhovuje žádné z těchto podmínek, neboť je právě tak nesnadna, jako nejnesnadnější jazyky živé a má stejné nevýhody: složitou a nepravidelnou mluvnici

[1] Viz »Č. E.« ročník I. sešit 5.—8. a 12.
[2] »Č. E.« I. str. 46—47.

i skladbu. Má jen jedinou výhodu: byla by totiž jazykem neutrálním. Za to má ohromnou nevýhodu: jest jazykem mrtvým; struktura a slovník její odpovídají stavu civilisace, který již minul a nikdy se nevrátí. Právě z té příčiny přestali jí učenci užívati, kteří se v ní přece tak dobře vyznali. Běhu století nelze obrátiti; mrtvých nelze již vzkřísiti.

Někteří však pokusili se latinu vzkřísiti a nové krve jí vpraviti; namítá se, že lze jí přesně vyjadřovati moderní myšlenky. Za příklad uvádí se Vox Urbis, kde je důmyslně přeloženo slovo kolo (bicykl) výrazem birota velocissima.[3] Tato skvostná perifrase (opsání) zajisté by velmi slušela nějaké latinské básni; byla by však těžkopádná a ne na svém místě v obchodním dopise nebo nad výkladní skříní. A kolik je pojmů vědeckých a technických, pro které latina nemá ani srozumitelných opisů! Měl-li by se již zvoliti jazyk mrtvý, byl bych pro řečtinu, jež se velmi dobře hodí ke tvoření nových slov a ze které je vypůjčeno mnoho výrazů technických.[4]

Ale připusťme, že by se latinský slovník zmodernisoval a obohatil neologismy (novotvary, novými slovy), jaké puristé (»brusiči«, přátelé čistoty jazyka) považují za barbarismy (cizomluvy), na př.: magazina a realisare (Leibniz). Tu by přece ještě mluvnice a skladba zůstaly příliš nesnadny a složity. Bylo by tedy třeba zjednodušiti obé: uvésti všechna jména na jediný vzor, všechna slovesa na jediné časování. Avšak takto změněný jazyk nebyl by již latinou Ciceronovou, ani latinou scholastikův; byl by to jazyk umělý s latinským podkladem a tedy mnohem méně prostý a méně internacionální než jazyk ryze umělý.

Nad to porazila by takováto reforma hlavní důvod přivrženců latiny a šla by mimo jejich nejvřelejší přání. Vždyť, zastávají-li toto rozluštění, činí tak, aby obnovili a oživili mrtvou tradici a spojili studia klassická se studiemi přírodovědeckými. A tato novolatina měla by pouze společné jméno s jazykem Virgilovým a humanistické vzdělání by se neuchovalo, nýbrž naopak, nadobro po-

---

[3] Angelo Valdarnini, Il sovraccarico della mente e lo studio d' una lingua internazionale. Bologna, 1900.

[4] Také pan Raul de la Grasserie navrhoval, aby se kmeny jazyka mezinárodního vzaly z řečtiny (De la possibilité et des conditions d' une langue internationale. Paříž. Maisonneuve. 1892.)

hřbilo, kdyby se mělo sdružiti s nějakým barbarským jazykem, jehož by latiníci neuznávali.[5]

Právě naopak mají přivrženci klassických studií, jakýmž i já jsem, jen jediný prostředek na svou ochranu proti stále rostoucí konkurenci realií a především živých jazyků: totiž působení pro přijetí jazyka mezinárodního, který činil by zbytečným učení se několika cizím jazykům; vždyť lze se mu naučiti mnohem snáze než kterémukoli jazyku živému, tak že zbyl by takřka všechen čas volný buď pro důkladné studium jazykův a literatur klassických, buď pro vědy přírodní a vědomosti praktické. Bylo by to také nejlepším prostředkem, jímž předešlo by se přetěžování učivem na středních školách ve všech zemích, neb alespoň povrchnímu promrskávání, na něž si právem učitelé stěžují.[6]

Vše, co lze říci ve prospěch latiny a řečtiny, jest, že oba tyto jazyky daly kořeny většině vědeckých výrazův, a že jazyk mezinárodní musí svoje vědecké názvosloví čerpati z nich, poněvadž jejich slovník je větším dílem mezinárodní. Jest se nám však střežiti každé výstřednosti a nedlužiti si všech kořenů jedině z jazyků mrtvých: Takovýto slovník nebyl by dosti mezinárodním (pro ty, kdož znají jenom jazyk mateřský), ani vpravdě neutrálním; favorisoval by příliš národy kmene románského a mohlo by se státi, že by ho nepřijali národové germánští[7] a slovanští. Uvidíme později, jak dalece a dle kterých zásad možno užiti kmenů řecko-latinských ve slovníku jazyka mezinárodního. Mnoho však záleží na tom, aby se jazyk tento přiblížil jazykům národním, alespoň vzhledem k slovům nejčastěji užívaným; a to jest možno, jak uvidíme později.

---

[5] Totéž dalo by se říci i o jistých návrzích, kterak zjednodušit a v pravidla uvésti některý jazyk živý: Především nevyhovují podmínce neutrality; dále, takovýto jazyk byl by nesrozumitelným i lidu, od něhož byl vypůjčen, tak že tento »favorisovaný« národ byl by posledním, jenž by vlastní svůj znetvořený jazyk přijal. Víme, s jakým odporem setkává se i nejmenší oprava pravopisná nebo slohová u zastanců tradice; je tedy nepoměrně snazším zavésti jazyk zcela nový, nežli jazyk takto změněný; nezmiňuji se ani o tom, že jazyk umělý bude vždy mnohem jednodušší, pravidelnější a internacionálnější.

[6] Ernst Naville, »La Langue internationale«, pamětní spis předložený akademii. Leden 1899.

[7] Viz „Č. E." I. str. 32.

ZÁJMENA — OSTATNÍ.[1]

Píše *J. Holub.*

Označení:	Jednotlivec. 1. -u	Vlastnost adjektivní. 2. -a	Substantivum. 3. -o	Vlastník. 4. -es
I. i- Neurčitá.	iu někdo, kdosi, některý, kterýsi	ia nějaký, jakýsi	io něco, cosi	ies něčí
II. ki- Tázací — Vztažná.	kiu kdo, který, jenž	kia jaký	kio co	kies čí, jehož, jejichž
III. ti- Ukazovací.	tiu onen, ten	tia takový	tio to	ties toho
IV. ĉi- Hromadná	ĉiu každý	ĉia každý	ĉio vše	ĉies každého
V. neni- Záporná.	neniu nikdo, žádný	nenia nijaký	nenio nic	nenies ničí

Z tohoto přehledu je patrna souvislost jednotlivých zájmen jak tvarem, tak významem.

Postavíme-li vedle zájmen řady II. slůvko *ajn*, vznikne: *kiu ajn* kdokoli, kterýkoli; *kia ajn* jakýkoli; *kio ajn* cokoli; *kies ajn* číkoli.

Zájmena řady III. znamenají ukázání vzdálenější. Postavíme-li vedle nich sluvko *ĉi*, vznikne ukázání bližší. Na př.: *tiu ĉi* nebo *ĉi tiu* tento, tenhle, ten zde; *ĉi tio* nebo *tio ĉi* toto. Toto *ĉi* může státi buď před dotčeným zájmenem (*ĉi tiu*), nebo za ním (*tiu ĉi*), též může s ním býti spojeno kratičkou čárkou vodorovnou (*tiu-ĉi, ĉi-tiu*).

*

Zájmena sloupce 1. a 2. mají i množné číslo i čtvrtý pád.

Zájmena ve sloupci 3. též přibírají známku čtvrtého pádu *n*, ale nemají čísla množného.

Zájmena sloupce 4. se vůbec nemění: nepřibírají ani známky čtvrtého pádu, ani známky čísla množného.

*

Uvedu ještě několik příkladů a objasním smysl některých z oněch zájmen.

---

[1] Viz »Česk. Esp.« roč. I. str. 27, 49, 62 a 123.

Sloupec 1. — **Iu** je české někdo, kdosi, některý, některá, některé, kterýsi, kterási, kterési.

Se iu demandos je mi, diru, ke . . . Bude-li se někdo po mně ptáti, řekněte, že . . . — *Iu tie ĉi forgesis sian pluvombrelon* Kdosi zde zapomněl svůj deštník. — *Sendu al mi iun el viaj fratoj.* Pošli ke mně některého ze svých bratrův.

Poznámka. *Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.* Někteří lidé cítí se nejšťastnějšími, když vidí utrpení svých sousedů. V této větě českému někteří (množné číslo zájmena některý) odpovídá esperantské *kelkaj*. Za české »někteří« užívá se v Esperantě nikoli *iuj* nýbrž *kelkaj.*

Kelkaj el tiuj objektoj tre plaĉis al mi. Některé z oněch věcí velmi se mi líbily.

Kiu odpovídá českému kdo, který, která, které, kterýž . . . jenž, jež.

Kiu frapas, al tiu oni malfermos. Kdo tluče, tomu bude otevřeno. — *Kiun tagon mi povas vin atendi?* Který den (kterého dne) vás mohu očekávati? — *Kiu el ĉi tiuj libroj estas la via?* Která z těchto knih jest tvá? — *Kiuj el ĉi tiuj libroj estas la viaj?* Které z těchto knih jsou tvé? — *Kaj plej ĝojigas la vero, kiun ni mem malkovris.* A nejvíce těší pravda, již jsme sami objevili. — *Tiu, kiu ludas la rolon de reĝoj.* Ten, jenž hraje úlohu králů. *Nur se iu troviĝus, kiu la fruktojn elgardus.* Kdyby se jen někdo našel, co by ovoce uhlídal.

Tiu onen, ona, ono; ten, ta, to; *tiu ĉi* nebo *ĉi tiu* tento, tato, toto; tenhle . . . ukázání bližší předešlého.

Ĉi tiu pentraĵo multe pli plaĉas al mi ol tiu, kiu pendas en la apuda ĉambro. Tento obraz líbí se mi mnohem více než ten, který visí ve vedlejším pokoji. — *Tiuj, kiuj ne venis.* Ti, kteří nepřišli.

Ĉiu každý, každá, každé. *Ĉiuj* všichni, všechny, všechna. *Ĉiu homo devas morti.* Každý člověk musí zemříti. — *Ĉiuj internaciaj partioj, ĉiuj internaciaj religioj devas havi internaciajn revuojn, kaj esperantistoj faros bone, se ili fondos tiajn revuojn.* Všechny mezinárodní strany, všechna mezinárodní náboženství mají míti mezinárodní revue, a esperantisté učiní dobře, založí-li takové revue.

Neniu nikdo, žádný, žádná, žádné.

Neniu vidas siajn mankojn. Nikdo chyb svých nevidí. — *Li rigardis ĉiuflanke kaj vidis neniun.* Rozhlížel se na všechny strany a neviděl nikoho. — *La lingvo neŭtrala apartenas al neniu nacio kaj neniu partio, kaj tial ĝi povas esti proponata al ĉiuj nacioj kaj al ĉiuj partioj.* Jazyk neutrální nenáleží žádnému národu a žádné straně, a proto může býti navrhován všem národům a všem stranám.

*

Sloupec 2. —

Ia užívá se jako českých zájmen nějaký, jakýsi, nějaká, jakási, nějaké, jakési.

Societoj, kiuj donacus ian sumon spolky, které by darovaly nějaký obnos. — *Pro ia al ni nekonata kaŭzo* z jakési nám neznámé příčiny.

Poznámka. Ve rčení: po nějakém čase zájmeno nějaký překládáme *kelka*. Pravíme tedy: *post kelka tempo.*

TVORBA SLOV V ESPERANTĚ PŘÍPONAMI.[1]

Píše *Josef Krumpholc.*

Jako naše koncovky *-ář, -ař, -ieř, -éř, -íř,* na př. ve slovech kovář, vinař, hrnčíř, staročesky hrnčieř, koštéř atd. vznikly napodobením latinského *-arius* (secretarius = sekretář) a staroněmeckého *-âri, -aere, -er* (rihtâri-rihtaere-rihter = rychtář),[2] podobně i přípony esperantské vznikly nápodobou koncovek jazyků »přirozených«.

Kdežto však v jazycích přirozených tvoří se jména, na př. osob zabývajících se něčím, příponami rozličnými — v češtině na př. koncovkou: *-ař* písař, *-ář* hodinář, *-íř* malíř, *-ič* holič, *-ač* hlídač, *-áč* oráč, *-ec* tkadlec, *-ník* dělník, *-tel* učitel — v Esperantě všechna tato a taková slova tvoří se důsledně a tedy výhodně příponou jedinou **-isto**. Příklady. *Telegrafisto, biciklisto, tenoristo, esperantisto, ĵurnalisto, optikisto, anarĥisto, monarĥisto* atd.,

[1] Viz »Čes. Esp.« I. str. 76 a 109.

[2] Dr. J. Gebauer: »Mluvnice česká pro školy střední a ústavy učitelské« I. § 72. 3.

a ovšem i nahoře uvedená slova: písař *skribisto*, hodinář *horloĝisto*, malíř *pentristo*, holič *razisto*, hlídač *gardisto*, oráč *plugisto*, tkadlec *teksisto*, dělník *laboristo*, učitel *instruisto* atd.

Ostatní přípony odvozovací jsou:

-ad (z franc.) značí trvání, násobení, opětování činnosti neb děje. *Paŝti* pásti, *paŝtadi* pásati, pásávati; *iradi* choditi, *ĵetadi* házeti atd. Příponou *-ad* tvoří se i podstatná jména slovesná, jako: *legado* čtení, *skribado* psaní, *lavado* mytí, *banado* koupání, *rustado* rezavění, *movado* pohyb, hnutí; *kudrado* šití, *parolado* přednáška, *estado* bytí, existence atd.

-an značí jako v češtině a ve mnoha jiných jazycích, obyvatele, stoupence, člena: *Amerikano* Amerikán, *Parizano* Pařížan, *kristano* křesťan, *luterano* luterán, *respublikano* republikán, *samideano* (sam-ide-an-o) stoupenec téže ideje atd.

-ar (latinské arium) podobá se našemu -ář (slabikář), ruskému -ar (slovar = slovník = vortaro) a jest obdobné naší příponě *-stvo* (*-ctvo*) ve slovech hromadných, jako: čtenářstvo *legantaro*, časopisectvo *gazetaro* atd. Značí hromadu, sbírku, souhrn sourodých bytostí: *Arbo* strom, *arbaro* les (= množství stromů); *ido* potomek, *idaro* potomstvo, *junularo* mládež, *ŝtuparo* schody, *vagonaro* vlak, *radaro* soukolí, *kolonaro* sloupení, *gradaro* stupnice, *estraro* vrchnost, představenstvo; *ministraro* ministerstvo, *instruistaro* učitelstvo, *membraro* členstvo atd.

-aj (z franc.) značí něco význačné vlastnosti, zvláště látky: *Tolo* plátno, *tolaĵo* prádlo (= výrobek z plátna); *vaksaĵo* vosková věc, *komercaĵo* kupecké zboží, *kokidaĵo* kuřecina (= kuřecí maso) a p.: *bovaĵo* hovězina, *bovidaĵo* telecí maso, *porkaĵo* vepřovina, *ŝafaĵo* skopovina; *ekzistaĵo* bytost, *falsaĵo* padělek, *sendaĵo* zásilka, *rustaĵo* rez, *kreskaĵo* rostlina, *rampaĵo* plaz, *supraĵo* povrch, *internaĵo* vnitřek, *sekaĵo* souš, *sablaĵo* písčina, *ĉirkaŭaĵo* okolí, *malaltaĵo* nížina, *profundaĵo* hlubina, *arkaĵo* klenba, *fortikaĵo* tvrz, pevnost, *ministraĵo* ministerstvo (úřad).

-ebl (z angl. a franc.) obdobné našemu *-elný*, *-á*, *-é* v přídavných jménech: řiditelný *direktebla*, viditelná *videbla*, změřitelné *mezurebla* atd. značí možnost něčeho. Co lze viděti je *videbla* viditelné; čemu možno věřiti je *kredebla* uvěřitelné, pravděpodobné; v co lze doufati je *esperebla* možné, nadějné; co lze prohlédnouti je *travidebla*

průhledné a p.: *legebla* čitelný (zřetelný rukopis), *komprenebla* pochopitelné, srozumitelné, *memorebla* pamatovatelné, *etendebla* roztažitelné atd.

-ec (hlavně ve vlaštině) jest obdobné našemu *-ost* a znamená vlastnost jakožto bytost: *Boneco* dobrotivost, *grandeco* velikost, *ebleco* možnost, *elasteco* pružnost, *internacieco* mezinárodnost, *elektreco* električnost, *intimeco* důvěrnost, *virineco* ženskost, *libereco* svoboda, *frateco* bratrství, *eterneco* věčnost atd.

Pokračování.

Z FRASEOLOGIE.

Jak se máte? (máš?)	Kiel vi fartas?
Děkuji, dobře.	Mi dankas, bone.
Má velkou žízeň; žízní velice.	Li tre soifas.
Mám hlad.	Mi malsatas.
Jaké jest počasí?	Kia estas la vetero?
Ráno bylo pěkně, ale nyní jest trochu mlhavo.	Matene estis bele, sed nun estas iom nebule.
Učiním, cokoliv budete chtíti.	Mi faros ĉion, kion aju vi deziros.
Kolik je teď hodin?	Kia horo estas nun?
Právě odbila třetí.	Ĵus batis la tria.
Brzy bude pět.	Baldaŭ estos la kvina.
Za pět minut dvě.	La dua post kvin minutoj.
Jest asi 12 hodin.	Estas kredeble la dekdua horo.
Snad se mýlíte.	Vi kredeble eraras.
Máte pravdu.	Vi estas prava.
Nemají pravdy.	Ili estas malpravaj.
Lépe pozdě než nikdy.	Pli bone estas agi malfrue ol neniam.
(Chci) vše nebo nic.	(Mi volas) ĉion aŭ nenion.
Hned, jak přijdete . . .	Tuj, kiam vi venos . . .
Prosím, posaďte se!	Mi petas, sidiĝu!
Račte usednouti (se posaditi.)	Volu sidiĝi.
Ruku v ruce.	Mano en mano.
Podej mi ruku.	Donu al mi vian manon.
Zavři okno!	Fermu la fenestron!
Zamkni dveře!	Ŝlosu la pordon!
Kdy přijde?	Kiam li venos?

Jakmile (až) se toto stane.	Kiam tio ĉi fariĝos (nebo okazos).
Mám vám něco říci.	Mi havas ion por diri al vi.
Máme mnoho práce (pilno).	Ni havas multe por fari.
Přijdu zítra ráno.	Mi venos morgaŭ matene.
Vrátil se včera večer.	Li revenis hieraŭ vespere.
Uvidíme se po dvou dnech.	Ni revidos post du tagoj.
Na shledanou!	Je revido!
Buď zdráv!	Estu sana!
Měj se dobře!	Fartu bone!
Buď vítán! Vítám tě!	Estu bonveninta!
Nemožno, řekla mu.	Neeble, ŝi diris al li.
Je čas k odchodu.	Estas la tempo por foriri.
Přicházíte včas.	Vi venas ĝustatempe.
Najednou.	Per unu fojo.
Řekl jste to již třikrát.	Vi diris tion ĉi jam trifoje.
Přišel jen jednou.	Li venis nur unufoje.
Přicházeli po dvou, po čtyřech.	Ili venadis duope, kvarope.
Rozsviť svíci, lampu!	Ekbruligu la kandelon, lampon!
Oheň hoří špatně.	La fajro brulas malbone.
Půjdu, dovolíte-li.	Mi iros, se vi permesos.
Ano, rád svoluji.	Jes, mi ĝoje permesas.
Co pravíte?	Kion vi diras?
Čeho potřebujete?	Kion vi bezonas?
Potřebuji více kdy (volného času).	Mi bezonas pli multe da libera tempo.
Nepotřebuji ničeho.	Mi bezonas nenion.
Kdo jest ve vedlejším pokoji?	Kiu estas en la apuda ĉambro?
Jsou tam dvě děti.	Estas tie du infanoj.
Zač je (co stojí) tato kniha?	Kiom kostas tiu ĉi libro?
Je za 3 koruny.	Ĝi kostas tri kronojn.
Kam tak spěcháte?	Kien vi tiel rapidas?
Nikam nejdu.	Nenien mi iras.
Jdu pěšky.	Mi iras piede.
Kolik je mu let? Jak je stár?	Kian aĝon li havas?
Má 16 let. Je mu 16 roků.	Li havas dekses jarojn.
Je šestnáctiletý.	Li estas deksesjara.
Je stařec šedesátiletý.	Li estas maljunulo sesdekjara.

Od té doby uplynulo již deset týdnů.	De tiu tempo pasis jam dek semajnoj.
Miluj svého bližního!	Amu vian proksimulon!
Nazelenalý, nažloutlý.	Dube verda, dube flava.
Tmavomodrý.	Mallume-blua.
Nedělej tolikých kroků!	Ne faru tiel grandajn paŝojn!
Spáti, dřímati, usnouti, spáti tvrdě.	Dormi, dormeti, ekdormi, dormegi.
Ani slůvka už!	Eĉ ne unu vorteton plu!
Zdali jste už o tom slyšeli?	Ĉu vi jam aŭdis pri ĉi afero?
Co dělá?	Kion li faras?
Byl nemocen.	Li estis malsana.
Přijdu až večer.	Mi venos ĝis vespere.
Tam a zpět.	Tien kaj reen.

TEKNIKA ANGULETO.

Sub la redakcio de *Ed. Kühnl.*

RAPIDE ANTAŬEN!

J. Sprague diris: Certe neniu estis pli ageme okupita per elektra komuniko kaj neniu fidas ĝian estontecon pli multe ol mi. Sed tiu ĉi estonteco ne konsistas en tuja, amasa ruinigo de grandaj nunaj sistemoj, sed en disvolviĝo de propra laborkampo kun limoj precizaj sed de granda amplekso. La elektro okupos tiun ĉi kampon preskaŭ ekskluzive: ĝi anstataŭos lokomotivon sur ĉeflinioj antaŭurbaj eĉ lokaj, ĝi ekkaptos plimulton de tramveturiloj kaj de urbaj fervojoj sur- eĉ subteraj; ĝi estos utila helpanto ĉe linioj ĉefaj; ĝi estos uzata ekskluzive sur montaj fervojoj; fine ĝi komu nikados rapide grandajn centrojn, sed ĝi ne enterigos lokomotivon, same kiel elektromotoro ne enterigis vapormaŝinon. Ili ambaŭ havas proprajn kaj rajtigitajn devojn por plenumi postulojn de nia civilizacio. — —

Bezono, konstrui fervojojn kun elektra movigo, fariĝas ĉiam pli kaj pli necesa, ĉefe, se oni volas plirapidigi komunikon; lokomotivoj plej rapidaj veturadas ĝis 100 *km* en unu horo, sed ĉar por rapideco pli granda taŭgas pli bone fluo elektra, oni uzis ĉi tiun ĉe veturoj faritaj en jaro 1901 sur militista fervojo en Germanujo. Celo de tiuj eksperimentoj estis, atingi ducentkilometran rapidecon. Sed tiam estis neeble daŭrigi veturojn sur relvojo nesufiĉe forta, kiu minacis esti enfaligita per delira rapidvagono. Oni decidis rebonigi konstruaĵon relvojan, kiun oni anstataŭis per reloj pli pezantaj, provizitaj per pli multe da sojloj. Por malhelpi elreliĝon estas konstruita nova, memstara relo, superanta je 5 *cm* relojn, veturajn. Korekto de vagono konsistas nur en aliformigo de aksaroj. Kun nove aranĝita maŝino oni rekomencis en tiu ĉi jaro

pluajn veturojn, ĉe kiuj la rapideco de 200 km estis ne nur atingita, sed superita.

Por pentri impresojn gajnitajn dum tiu ĉi veturo, ni volas konigi la vortojn de Dro W. Reichel, kiu kondukis la rapidvagonon:

Kiam ni atente ĉion provizis eĉ provis haltigilojn kaj kiam ĉiuj partoprenantoj eniris en vagonon, ni antaŭsciigis la soldatpostenojn pri elveturo. La vagono murmurante, malrapide ekveturas, movigata per forto de 14.000 voltoj. Forlasante je la 9a horo 25 min. stacion Marienfelde, ni rigardas ankoraŭ unufoje la flukondukajn metalfadenojn, kiuj per forta vento ŝanceliĝas. Dum ekveturado la forto estas senintermanke plialtigata ĝis 350 amperoj por ĉiu el 4 aksmaŝinoj, t. e. funkcio de tuta vagono proksimiĝas al 2300 kilovatoj (egalas 2600 mekanikajn ĉevalfortojn).

Post dukilometra veturo la rapideca mezurilo montras 120 *km*; en la plej proksima tempo ni legas jam 150 *km* kaj atingante rapidecon 175 *km*, ni vidas jam la unuan vojturniĝon kun 2000-metra radio.[1]

Ĉe rapida alproksimiĝo la reloj ŝajnas esti kvazaŭ rompitaj, kaj tiu rigardo estas iom maltrankviliganta, ĉar oni pensas ricevi fortan puŝon. Ĝis en lasta momento, plej proksime al vojturniĝo, ni ĝoje rimarkas, ke anstataŭ sur rompiĝon, la vagono surveturas, modere kliniĝante, sur etan kurbiĝon de vojo. Post forlaso de tiu, ni ekvidas $1^1/_4$ *km* malproksime signalon montrantan malfermitan vojon, kaj ni suprenflugas deklivon de 1 : 200 sen bezoni pligrandigi la movigan forton kiel ĉe ordinaraj veturoj estas nepece. La rapideco altiĝas kaj la proksiman stacion Mahlow ni traveturas kun rapideco de 180—185 *km*, la relkruciĝojn kaj relforkojn glate transirante. Ŝajnus, ke la konstruaĵoj, telegrafaj stangoj kaj arboj preterflugis kaj ke la vagono staris, se tiu ĉi verŝajno ne estus malhelpata per radbruo.

Vidante la maŝinojn labori sendifekte, ni plialtigis la rapidecon ĝis 190—195 *km*; tiam ŝajnas la veturo duonsveniga, ĉar oni staras en frunto de vagono havante senpere antaŭ la okuloj relojn, dum sur lokomotivo la maŝino malhelpas rigardon tiel liberan. Oni dirus, ke la vagono glutas kilometrojn — en 18 sek. unu *km* — sed la homo ĉion kutimas baldaŭ kaj forgesante rapidecon atingitan, oni pensas veturi — pli rapide. Ĉiu rigardas atentege mezurilon. Subite ni vidas je 800 *m* malproksime du homojn inter reloj starantajn, kiuj ŝajnas amuziĝi pri atendata rapidvagono.

Tuja ekkapto de signala fajfilo kaj ni vidas, tre proksimen alveturinte, forsalton de ektimigitaj rigardantoj; vera feliĉo, ĉar vagono pezanta 93 tunojn, estus nehaltigebla antaŭ traveturo de almenaŭ $1^1/_2$ *km*, ĉe kio la ojstroj efikus premon du cent mil *kg*. — Ni preterflugas stacion Dahlovitz kun plena rapideco, polvon, sablon eĉ ŝtonetojn ventoturnigante, kaj ni eĉ ekvidas ĉapelsvingojn de alrigardantoj. Subite forta puŝo sur fruntfenestron altiras nian atenton: la vagono mortigis birdon preterpasitan. Rapideca montrilo alproksimiĝas jam al numero 200 kaj ĉe Rangsdorf ĝi superas ĝin. Ni troviĝas en duono de nia vojo; la vagono kun alpremitaj ojstroj, traveturas duan relkurbiĝon kaj poste daŭrigas

[1] Radio, latine radius, en geometrio duono de diametro.

kun rapideco 165 *km* veturon al Zossen, pelata per inercio, kiu estus provinta ĝin movigi ankoraŭ 30 *km*.

Ok minutojn daŭris traveturo de vojo 32-kilometra, kaj laŭ enskribo en morseaparato, la plej alta rapideco estis 200·8 *km* en horo. Post forlaso de vagono, kies fruntaĵo estis malpurigita per restaĵoj de frakasitaj kuloj kaj muŝoj, ni akceptis gratulojn de ĉeestantoj kaj trarigardis aksujojn kaj ĉiujn aparatojn de vagono, kiu sendifekte plenumis la malfacilan devon.

Antaŭ reveno estis telegrafe sendita sciigo pri gajnita sukceso al imperiestro kaj post 20 minuta haltiĝo, la vagono ekveturas jam denove por reveni.

Kvankam ĉi veturo plenumis definitan celon — veturi 200 *km* en horo — tamen oni ne ĉesigis la veturojn per ĉi fakto, kontraŭe, la inĝenieroj estis logataj atingi rezultaton ankoraŭ pli mirindan. Oni daŭrigadis preskaŭ ĉiutage veturojn kaj ĉe finigo de ĉiu nova veturo montris la rapideca mezurilo ĉiam pli kaj pli kontentigan numeron.

La lasta de tiuj numeroj estis la plej granda — 215 *km* en horo.

Ambaŭ vagonoj, kiuj servas al ĉi provoj (la unua konstruita de »Allgemeine Electricitäts-Gesellschaft« en Berlino kaj la dua de l' firmo »Siemens & Halske«, montriĝis bone taŭgaj kaj ilia marŝo estis tiel trankvila, ke oni povis skribi rimarkojn eĉ dum la plej granda rapideco.

Ĵus finitaj veturoj ne estis lastaj; enkonduko de rapidaj veturoj en praktikan vivon, fariĝos post nemultaj jaroj fakto.

Pli malgranda perdo da tempo, pli ofta servo, unuvorte oportuneco dezirebla, alportos al kuraĝaj entreprenantoj de estonta fervojo ne nur meritвитan rekompencon materialan, sed eĉ memoron ĉe niaj posteuloj.

KION NI ŜULDAS AL KVAKEROJ[1], »SOCIETO DE AMIKOJ.«

Kiom el tiuj miloj da homoj, kiuj ĉiutage veturas fervoje, scias, ke ili ŝuldas la enkondukon de la »ferĉevalo« en Anglujon, kaj tiel en la mondon, al Kvakero?

Tre malmultaj, oni konjektus. Tamen estas fakto ne neigebla.

[1] Kvakeroj (laŭ angla „Quakers" = Tremuloj) estas religia partio kristana, kies anoj nomas sin reciproke „amikoj". Ili konfesas en esenco protestantismon, sed krom tio ili estas tre severaj kaj ĝustegaj koncerne vivadon, forĵetante ĉiun lukson, ĵuradon kaj militon. Al ĉiu ili diras „ci" kaj salutante, antaŭ neniu ili forprenas ĉapon. Pastraron ili tute ne havas, dioservo ilia konsistas el pia kantado; prediki en kunvenoj povas ĉiu, kiu sentas sin kapabla por tio.
Redakcio.

Estas certe Stephenson, kiu efektive konstruis la unuan lokomotivon; kaj li ne estis Kvakero, sed estis Kvakero Edward Pease el Darlington, kiu donis la monon por la unuaj provoj, kaj kiu poste financis la unuan fervojon sur angla tero, tiun de Stockton al Darlington.

Poste »Amiko« Ellis el Leicester komencis la faradon de la nuntempe potenca fervojo »Midland«. »Amiko« Bradshaw publikigis la unuan veturplanon aŭ »gvidlibron« por sciigi al homoj en kioma horo kaj kie la vagonaroj foriros de, kaj alvenos al la stacioj. »Amiko« Edmondson antaŭvidante, ke devige ĉesus la metodo de antaŭa enskribado de la nomoj de veturantoj, daŭrigata de la tempo de ĉevalveturiloj, elpensis la bileton kaj ankaŭ la maŝinon por presi la daton sur ĝin.

Kiam Kvakeroj fariĝis potencaj en la lando, unue ne estis movado por malhelpi la uzadon de alkoholaĵoj. Biero — bonega biero kaj multe da ĝi, estis juĝata necesega por la bonfarto de la anglaj popoloj. Do Kvakeroj. kun ilia kutima energio kaj entreprenemo, komencis fari bieron; kaj la rezultato estis la pligrandiĝo de tiaj mondkonataj firmoj kiel »Walkers«. »Allens«, »Hanburys«, »Buxtons« kaj »Barclay Perkins«, firmoj, kiuj preparadis hordeon por fari bieron.

Poste la enkonduko de la movado kontraŭ alkoholo, la »Societo de Amikoj« ekkredis, ke la bierfarado estas ne laŭ la leĝoj moralaj kaj ili kviete retiriĝis de la bierfarado.

Ili ankaŭ serĉis, ĉu estas eble trovi kian ajn trinkaĵon, kiu anstataŭus bieron en la popola estimo.

Ili ĝin trovis, aŭ pensis, ke ili ĝin estis trovintaj, ĉe ĉokolado; kaj »Amiko« Cadbury el Birmingham, »Amiko« Fry el Bristol kaj »Amiko« Rowntree el York fondis fabrikojn por farado de ĉokolado, kiuj nuntempe portas iliajn nomojn kaj estas kondukataj de iliaj idoj. »Amiko« Bryant metis pecon da fosforo sur la pinton de peceto da ligno kaj ĝin montris al »Amiko« May. La grava firmo de fabrikantoj de alumetoj »Bryant May« estis la rezultato. »Amiko« Reckitt elpensis bluilon por doni pli bonan kaj pli klaran blankecon al tolaĵoj, kiam ili estas lavataj; kaj li akiris grandegan havon. »Amiko« Huntley pensis, ke la rondaj, hejmefaritaj kuketoj, kiujn faradis la kvakeraj virinoj, povus esti plibonigitaj kaj estis

elementoj de sukceso en la ideo. »Amiko« Palmer ankaŭ tiel pensis, kaj ili kune fondis fabriketon, de kiu fariĝis la vasta kaj grava firmo nomita »Huntley Palmer«, fabrikantoj de biskvitoj.

Ĉe la demando pri la transporto de »Cleopatra's Needle« (Obelisko Egipta) de Aleksandrio en Egiptujo al Anglujo kaj ĝia vertikaligo sur la bordo de Tamiso (rivero, kiu fluas tra Londono), oni diskutadis, ĉu iu inĝeniero troviĝos por entrepreni la laboron necesan por levado de la peza monolito[2]. »Amiko« Tangye ĝin entreprenis plensukcese, kaj poste »Amiko« Dixie ĝin vertikaligis sur la piedestalo staranta sur la bordo de Tamiso.

Estis »Amikino« Elizabeth Fry, kiu, en la lasta centjaro, komencis la reformon de la traktado de la punlaboristoj en la malliberejoj de Anglujo, vizitante sentime kaj sola la teruran parton por virinoj (Womens' Ward) de Newgate (angla malliberejo), kvankam admonita antaŭe, ke la sovaĝulinoj al ŝi disŝirus membrojn de membroj.

Ŝi ankaŭ laboris pro la malliberuloj en la urboj de Eŭropo.

Multaj el la ideoj de tiu nobla virino okupas hodiaŭ en Anglujo gravajn poziciojn, inter ili estas Sir Theodore Fry, la bone konata politikisto kaj estro de la grava firmo »Sir Theodore Fry & Co Ld«, fabrikantoj de fero, »Right Honorable Sir Edward Fry«, la eksjuĝanto de la juĝa kortego de Anglujo kaj s-o Lewis Fry, membro de parlamento por la urbo Bristol.

La banka sistemo de Granda Britanujo antaŭ centjaro estis la miro kaj envio de la mondo, kaj ke ĝi estis tia merito apartenas al Kvakeroj. »Overend, Gurney & Kompanio« estis kvakera financa firmo. Tia ankaŭ estas »Barclay, Bevan & Ko«; la fondinto de tiu firmo, estante ido de tiu Robert Barclay, la »Laird of Ury«, kiun Whittier, la kvakera poeto, faris senmorta.

Farmistoj neniam havis daŭrantan plugilŝaron[3] (plugildenton) ĝis la tempo, kiam »Amiko« Ransome el Ipswich elpensis unu faritan el fero malvarmigita, kiu per tiu elpenso fondis ankoraŭ alian gravan firmon kvakeran.

---

[2] Monolito = objekto farita el unu peco da ŝtono.
[3] Plugilŝaro = boh. rádlo, radlice, germ. Pflugschar, fr. dent de charrue.

»Amiko« Abraham malkovris la sekreton de ferfandado de la Holandanoj; kaj la grandaj fabrikoj por ferfandaĵo en Coalbrookdale, estis la rezultato.

Efektiva porcelano, kiel la vorto estas nun komprenata, ne estis fabrikata en Anglujo ĝis la mezo de la dekoka centjaro, kiam »Amiko« Cookworthy malkovris la »ĥinan« argilon en Cornwall.

La kalikotoj de »Amiko« Hoyle ankoraŭ ne estas superitaj en la bazaroj de Anglujo. La ĉapeloj de »Amiko« Christy estas el la plej bonaj de la mondo.

»Amiko« John Dalton estis scienculo, kiu eltrovis la leĝon de atomaj proporcioj. »Amiko« Thomas Young, kiu venis Londonon, kiam li estis juna, de sia hejmo en la okcidento de Anglujo, vestita en la plej simplaj el kvakeraj vestoj, fariĝis pli malfrue la grava filozofo, kies teorio de lumo revoluciigis la astronomian instruadon.

»Amiko« Lister fariĝis kuracisto kaj, teruriĝante pri la mortoj en malsanulejoj post »ĥirurgaj operacioj«, eklaboris por trovi rimedon. La rezultato estis tiu tre granda elpenso de la centjaro »antiseptika ĥirurgaĵo«[4], kaj tiam »Amiko« Lister unue fariĝis Sir James Lister kaj poste Lord Lister, angla nobelo.

»Amiko« John Bright, politikisto, lasis la mondon pli bonan ol li ĝin trovis. Tiel faris ankaŭ Dro Birkbeck, la fondinto de »Mechanics' Institutes«.

Neal Dow, la kontraŭ-alkoholisto, reformisto kaj William Edward Forster, la ministro, kiu kondukis la leĝon pri edukado de 1870 jaro tra la angla parlamento, havas kvakeran parencaron.

La itala Markizo de Mortda, la fama botanikisto, estis antaŭe Thomas Hanbury, Kvakero kaj ĥemiisto, kaj estis unu el la fonditoj de la firmo »Allen & Hanbury«.

Sir Robert Fowler, kiu estis dufoje »Lord Mayor« de Londono, havis kvakeran parencaron; tiel ankaŭ havis Sir Walter Scott, la fama verkisto kaj poeto; Lord Macaulay, kies patrino estis membrino de la partio; Sir Henry Rawlinson, la egiptologisto; Sir Samuel Cunard, la fondinto de la Atlantika vaporŝipa firmo, Lord Lyndhurst, la eminenta leĝisto; Boulton,

---

[4] Angla »Antiseptic surgery«.

kiu uzadigis la vapormaŝinon de Watt; Dro Tregellis, la biblia saĝulo; Abraham Lincoln, la mortigita prezidanto amerika; Dro Birch, zorganto de Reĝo Edward VII. kaj Sir T. Fowell Buxton, la nevenkebla kaj sentima batalanto pro la sklavoj.

Sed ĉio, kion materie ni ŝuldas al Kvakeroj — kvankam tiu ŝuldo estas grandega — estas sensignifa kontraŭ nia morala ŝuldo ĉe ili. Ili estis la unuaj, kiuj kontraŭbatalis la religian tiranecon. Ili gajnis por ni en Anglujo la civilan kaj religian liberecon, kiun ni nune ĝuas, tamen ne sen multa suferado. George Fox, la fondinto de la partio, estis malliberigata en multaj malliberejoj en Anglujo kaj estis multfoje preskaŭ mortigata de la amaso. Kaj liaj lernantoj estis traktataj eĉ pli malbone ol li mem. Dum la 25 jaroj de la regado de Karolo II., 13.562 Kvakeroj estis malliberigataj pro konfesio, 198 estis transportitaj trans la maroj kaj 338 mortis en malliberejoj.

El la angla ĉiusemajna jurnalo
»Pearson's Weekly«
kun permeso de la redakcio
tradukis *Thomas Hoskison.*

EN NORDAJ MAROJ.

Originale verkita de *Marie Skalská.*

Imagu, ke iu homevitulo, vivanta en mallarĝaj cirkonstancoj kaj kunlaĉitaj humoroj de malgranda urbo, kreas por si en sia animo alian mondon, ke li sonĝas kaj revas pri malproksimaj landoj, pri fremdaj nacioj, pri nekonata naturo, ke li soifas je io nova, per kio oni sentas sin renaskita, levita. Kaj jen al vagema fantazio venas penso pri maro. »Ah, maro« — li pensas — »malproksima kaj neatingebla ĝi estas, kaj tamen — tie devas esti alia mondo, tie per unu sola ega elspiro devas de homo fali ĉio, premanta lin, tie la koro malfermiĝos por neekkonitaj belecoj, tie la interno ekribelos en pasia liberiĝo . . . .«

Vivo iam estas mirinde danka, kaj en siaj artaj kaj okazaj komplikaĵoj ĝi kvazaŭ notadas, kion belan tiu aŭ alia revis kaj volis en soleco, kaj poste mezurinte la fortecon de tiu multobla volado, suminte ĉiujn maljustaĵojn, per kiuj ĝi vundis, ĉiujn momentojn, en kiuj ĝi sensente

forĵetis nin kaj kondamnis al larmoj — tiu vivo iam ekturnas urnon, kaj jen — la homo surprizita, per sufero kaj vana sopiro antaŭtempe maljuniĝinta, en momento troviĝas en tiu elsopirita mondo, en tiuj malproksimoj, kiujn li ne povis eĉ kompreni en malfavoraj ĉiutagaj cirkonstancoj.

Li troviĝas sur maro. Ne ie sur sunplena marbordo, sed en maro, en senlima oceano, dezerta kaj vastega, majesta per siaj melankolio kaj nekomparebla parolo de elementoj liberaj, tiom plene s i a j. Li troviĝas en maroj, plenaj de nemezurebla forto kaj sovaĝaj, frenezaj bruegoj. Nenie limoj, nur eterno kiel arkaĵo super profunda, senfunda akvaro. Per centoj da voĉoj parolas la enigma maro; tiu neesplorebla estaĵo kvazaŭ havus mil vizaĝojn kaj tamen nur unu solan — tiun — trankvile kaj majeste submetantan la animon . . . .

Kion sentas en sia interno la homo, kiu tiel per ekblovo de okazo troviĝis sur ŝipo trempiĝanta en misterojn de nordaj maroj kaj rapidanta en elpensitajn dezertojn de senfinaj, malvarmaj kaj frostaj sferoj post polusa rondo? Malfacile oni povas esprimi, kiel duonsvenigas tiu terura forto de oceano, kaj oni ne povas priskribi la ĝemojn, kiuj tie fluas el la animo venkita, lacigita de impresoj. Tie brue kuradas la ventoj kaj iliaj spiroj sulkigas la nivelon; tie rompiĝas fortoj kaj fendiĝas en vanaj bataloj . . . nur eterna flugilo de tempo trankvile moviĝas antaŭen, kvazaŭ ĝi estus interkonsentita kun ĉiuj kapricoj de maro — siajn movojn neniam ĝi haltos kaj eĉ ne disondos pli rapide — — — — — — — — — — — —
— — — — — — — — — — — — — — — — —

KLARIGO.

De kelka tempo ni skribas kaj ankaŭ estonte skribos **Moravio, Aŭstrio.** Kial? Moravio estas loĝata de Bohemoj kaj Germanoj, Aŭstrio de kelke da diversaj nacioj. Se en vortoj Francujo, Anglujo, Rusujo, Bohemujo k. t. p. **-uj** signifas landon loĝatan de Francoj . . ., historian patrujon de . . ., do en niaj ambaŭ okazoj oni ne estas prava uzi tiun ĉi sufikson, ĉar ne ekzistas n a c i o de Moravoj aŭ de Aŭstroj. Ni elektis radikojn kun »**i**« tial, ĉar en tiu formo ili evidente estas pli internaciaj ol sen ĝi.

Sed per tiu ĉi ŝanĝo ni tute ne intencas instigi korekteman pasion. Redakcio.

KRONIKO.

Sub la redakcio de *J. Grňa.*

Nia neforgesebla amiko kaj kunlaboranto

Ivan Osipovič SELEZNJOV

ne vivas plu. . . Nun li jam ne suferos!

Čechy. Morava. »*Esperantský klub v Praze*«. měl 21. ledna 1904 valnou schůzi v klubovních místnostech kavárny Tůmovy s tímto pořadem: Čtení zprávy jednatele, pokladníka a knihovníka; návrh změny stanov; návrh stanov odborů; volba výboru; volné návrhy. Bohatá korrespondence a množství dotazů po Esperantu svědčí o čilém životě Esperanta v Čechách. Zvláště s Řetenicí u Teplic bylo jednáno o založení odboru »Esp. klubu v Praze« a to pohnulo klub ke změně stanov a k návrhu nových, volnějších stanov odborových, jimiž mohli by se říditi také přespolní členové. Do výboru zvoleni opět pp: *Kraus* předsedou, *Kühnl Fr.* místopředsedou, *Kühnl Ed.* jednatelem, *Barvíř Jos.* zapisovatelem, *Kamarýt St.* pokladníkem, *Novotný Vojt.* knihovníkem, pak *Blumauer* a *Görner*. Z Plzně zaslán shromáždění panem Kutílkem a 30 přáteli pozdravný telegram, psaný Esperantem. Po schůzi vylíčil p. Kühnl Ed. k požádání pana předsedy Krause vzpomínky ze své cesty Francií a Anglií a zkušenosti s Esperantem. Přednáška tato zajímavým svým obsahem potěšila všechny posluchače a přesvědčila je o velkém významu Esperanta v cizině se stanoviska praktického. — *Ve Strakonicích* p. V. Wiedemann pracuje na založení »místní skupiny esperantistů«, a v *Teplicích* zase p. Jos. Kubík s panem

Bohemujo. Moravio. »*Esperantista klubo*« *en Praha* havis la 21. I. 1904 la ĝeneralan kunvenon en la kluba ĉambro de kafejo »Tůma« kun jena programo: Lego de raportoj de sekretario, kasisto kaj bibliotekisto; propono de ŝanĝo en regularo; propono de grupa regularo; elekto de komitato; liberaj proponoj. Riĉa korespondado kaj multaj demandoj pri Esperanto atestas jam viglan vivon de Esperanto en nia lando. Precipe kun Řetenice apud Teplice oni agis pri fondo de filio de »E. k. en Praha« kaj tio igis la klubon ŝanĝi sian regularon kaj proponi novan, pli oportunan regularon grupan, laŭ kiu povus aniĝi ankaŭ eksteraj amikoj. En komitaton estis reelektitaj s-oj: *Kraus* prezidanto, *Kühnl Fr.* viceprezidanto, *Kühnl Ed.* sekretario, *Barvíř Jos.* enskribisto, *Kamarýt St.* kasisto, *Novotný V.* bibliotekisto, *Blumauer* kaj *Görner.* Al kunveno estis alsendita de s-o Kutílek kaj de 30 samideanoj el Plzeň salutanta telegramo en Esperanto. Post finita kunveno ekpetis prezidanto s-o Kraus s-on Kühnl Ed., ke li rakontu siajn memorojn de vojaĝo tra Francujo kaj Anglujo, kune eĉ spertojn pri Esperanto. Tiu ĉi priparolo, per sia tre interesa enhavo, ekĝojigis ĉiujn aŭdantojn kaj donis al ili impreson pri granda signifo de Esperanto en fremdaj landoj de vidopunkto

Havelkou utvořili kroužek as 30 přátel, jež cvičí v jazyku mezinárodním p. Jos. Kubík. — *I časopisy* počínají více pracovati pro naši věc. — »Čas«, »Hlas Národa«, »Pražské noviny« počínají uveřejňovati sympatické články o Esperantu a tak seznamovati s ideou pomocného jazyka mezinárodního nejen obyvatelstvo Prahy, ale i venkovské, mimopražské. – V těsnopisném časopise »*Multum*«, jejž vydává V. Beneš ve Vršovicích, uveřejnil 2 články o Esperantu p. Frant. Kühnl. – V »*Právu Šumavanů*« uveřejnil p. V. Wiedemann několik feuilletonů s výslovným podotknutím, že jsou to překlady z Esperanta, pak začátkem r. 1904. pojednání o Esperantu a o řeči mezinárodní a posléz několik dopisů francouzských professorů. — Čtenáři naši pamatují se na zprávu »Č. E.«, že »*Národní Listy*« přinesly překlad povídky »Malsana junulo«, již pro »Č. E.« z flanderského jazyka přeložil Dr. Raym. Van Melckebeke. — Zaslali jsme panu Dr. Melckebekovi ono číslo »N. L.«, načež dostali jsme od něho lístek, kde mezi jiným čteme: »My, Flandrové, přikládáme Esperantu velkou cenu, poněvadž jím šíří se známost naší literatury — za hranicemi neznámé: z flanderštiny do jazyka francouzského dokonale překládati je vůbec nemožno. — Takto český časopis pomáhá propagovati Esperanto u nás ve Flandrech! Podivno!« . . . — **Anglie.** Každým okamžikem nabývá Esperanto v Anglii nových úspěchů. Roku 1903 založeno bylo 12 spolků esperantistů a 1904 už zas k nim přibyl nový spolek v Tyneside u Newcastle. — Časopis »*The Esperantist*« v č. 3. přináší několik zajímavých článků, zvláště o nedávno objeveném prvku radiu. — **Belgie.** Universitní professor z Dijonu (Fran-

praktika. — *En Strakonice* laboras s-o V. Wiedemann pri la fondo de »loka grupo esperantista« kaj en *Teplice* fondis s-oj Jos. Kubík kaj Havelka tablan rondeton da 30 amikoj, kiuj partoprenas en la kurso esperanta, farata de s-o Kubík. Ankaŭ *gazetaro* komencas pli labori por nia afero. — Ĉiutagaj gazetoj, aperantaj en Praha, »Čas«, »Hlas národa«, »Pražské noviny« komencas publikigadi rekomendajn artikolojn pri Esperanto kaj tiel konatiĝas la ideo pri helpa lingvo internacia ne nur inter loĝantoj de Praha, sed ankaŭ inter nombra legantaro provinca. — En »*Multum*«, gazeto por stenografiistoj, eldonata de V. Beneš en Vršovice-Praha, publikigis s-o Fr. Kühnl 2 artikolojn pri Esperanto. — En »*Právo Šumavanů*« publikigis s-o V. Wiedemann kelke da felietonoj kun rimarko, ke ili estas tradukitaj el Esperanto, poste komence de jaro 1904 artikolon pri Esperanto kaj pri lingvo internacia kaj fine kelke da leteroj de profesoroj francaj. — Niaj legantoj memoras ankoraŭ komunikon en »Č. E.«, ke la gazeto »*Národní Listy*« alportis boheman tradukon de la rakonto »Malsana junulo«, kiun por »Č. E.« tradukis Dro Raym. Van Melckebeke el lingvo flandra. — Tiun Nron de »Národní Listy« ni sendis al s-o Van Melckebeke kaj ricevis de li karton, kie ni legas interalie: »Ni, Flandranoj, tre ŝatas tian utilon de Esperanto por konigi nian literaturon, ĉar ĝi estas malmulte konata en eksterlando: la franca lingvo tute ne taŭgas por la traduko. — Tiamaniere *bohema* gazeto tre helpas la propagandon en *Flandra* lando! Strange!«. . . — **Anglujo.** Esperanto sukcesas ĉiutage en Anglujo. Dum jaro 1903 estis fonditaj 12 societoj esperantistaj kaj denove-

cie) pan Ch. Lambert přednášel v listopadu 1903 o *jazyku mezinár.* a Esperantu zvláště s velkým úspěchem v Gentu, Luvani, Bruselu, Lutychu a v Antverpách. Účelem přednášek bylo získati Esperantu zejména universitní professory a studentstvo, a skutečně také tito tvořili hlavní část posluchačstva. Přednášky konány byly v místnostech universitních.

— V krátké době jednoho roku vzniklo v Belgii 9 spolků esperantistů, jichž členové vedle nečlenů účastňují se cvičebných kursů. O esperantském hnutí belgickém pravidelné zprávy přináší časopis »*La Belga Sonorilo.*«

— **Bulharsko.** Časopis Свѣтъ (Svět), jehož každé číslo obsahuje rubriku psanou v Esperantu, přinesl v 10. čísle bulharský překlad našeho článku »Evoluciismo« od Dr. T. G. Masaryka, uveřejněného v 10. čísle I. roč. »Č. E.« — A jak utěšeně ujímá se Esperanto mezi Bulhary, o tom svědčí zejména kursy a přednášky, jež dle 6. čísla esp. časopisu »*Rondiranto*« konány jsou v Plovdivě, Tirnovu, Staré Zagoře, Plevnu a v Silistře. —

Francie. Zde kvete už 30 spolků esperantských, z nichž pařížský má okolo 400 členů, dijonský a lyonský každý přes 100 členů. Z těchto spolků 17 založeno bylo r. 1903. Patrno, že Francouzové přec jen ještě »nestárnou«, jak by mnozí tomu chtěli. — **Hollandsko.** Kromě časopisu »*La Holanda Pioniro*« vycházeti bude nový »*La Stenografiisto*«. Roční předplatné 2 fr. 50 ctm. Vydavatel S. De Vries v *Amsterdamě*, Damstraat 24.

— **Italie.** »Italský spolek pro šíření Esperanta« převzal řízení a vydávání italského propagačního orgánu »*L' Esperantista*«. —

venas sciigo, ke en la lasta tempo estis fondita nova grupo en Tyneside apud Newcastle. — Revuo »*The Esperantist*«, Nro 3., alportas kelke da interesaj artikoloj, precipe pri antaŭ ne longe eltro, vita elemento radiumo. — **Belgujo.** *Ch. Lambert*, profesoro de la universitato en Dijon en novembro 1903 havis sukcesajn paroladojn pri lingvo internacia kaj Esperanto aparte en Gento, Loveno, Bruselo, Lieĝo kaj Antverpeno. Ĉi tiuj paroladoj celis precipe universitatajn profesorojn kaj studentojn, por ilin altiri al Esperanto. Efektive, la plej granda parto de l' aŭdantaro konsistis el ili. La paroladoj estis faritaj en universitatoj de l' nomitaj urboj. — Dum jaro 1903 naskiĝis en Belgujo 9 grupoj esperantistaj; iliaj membroj kaj eĉ aliaj personoj partoprenas en kursoj esperantaj. Pri esperantista movado en Belgujo raportas regule »*La Belga Sonorilo*«. — **Bulgarujo.** Gazeto Свѣтъ (Mondo), kies ĉiu Nro enhavas artikolon skribitan en Esperanto, alportis en Nro 10. bulgaran tradukon de l' artikolo »Evoluciismo« de Dro T. G. Masaryk, profesoro de l' universitato en Praha, publikigitan en Nro 10. jaro 1. de »Č. E.« — **Francujo.** Ĉi tie kreskas jam 30 grupoj esperantistaj, el kiuj grupo Pariza enhavas ĉirkaŭ 400 membrojn, grupoj Liona kaj Diĵona po 100 membroj. 17 el ĉi grupoj estis fonditaj dum jaro 1903. Ne vidas, ke Francoj ankoraŭ ni »maljuniĝas«, kion dezirus multaj! — **Holandujo.** Krom la gazeto »*La Holanda Pioniro*« estos eldonata »*La Stenografiisto.*« Abono por jaro 2 fr. 50 ctm. Eldonanto estas s-o S. de Vries en *Amsterdam*, Damstraat 24. — **Italujo.** »Itala societo por propagando de Esperanto« prenis sur sin direktadon kaj eldonadon de l' itala propa-

Německo. V posledních dnech dostali jsme potěšující zprávu, že v Berlíně založen byl spolek esperantistů. Přihlášky přijímá p. J. Borel, *Berlin*, Prinzenstr. 95. — Doufáme, že hnutí esperantské rozšíří se brzy po celém Německu, poněvadž velká firma nakladatelská Möller & Borel hodlá vydávati nový propagační orgán esperantský. — **Rusko.** Polský obrázkový týdenník »*Naokolo Swiata*« (Kolem světa) obsahuje v každém čísle esperantskou kroniku. Časopis vychází ve Varšavě redakcí p. Ant. Orlowského. — Kromě toho četné časopisy ruské přinášejí překlady z Esperanta nebo články jednající o Esperantu zpéra pana Dr. Šidlovského z Moskvy, Zinověva z Poltavy, Dr. Ostrovského z Jalty, Poljanského z Chabarovsku v Asii a j. — Z **Trinidadu** dochází nás zpráva, že p. G. O. Messerly zakládá v hlavním městě Port-of-Spainu sdružení esperantistů.

Germanujo. En lastaj tagoj ni ricevis ĝojigan sciigon, ke en Berlino estis fondita grupo esperantista. Oni turnu sin al s-o *J. Borel*, Berlin, Prinzenstr. 95. — Ni esperas, ke la movado esperantista disvastiĝos baldaŭ en tuta Germanujo, ĉar granda firmo eldonista Möller & Borel intencas eldonadi novan propagandan organon esperantistan. — **Rusujo.** Pola ĉiusemajna ilustrita gazeto »*Naokolo Swiata*» (Ĉirkaŭ la mondo) enhavas en ĉiu Nro esperantan kronikon. La gazeto eliras en Varsovio kaj ĝia redaktoro estas s-o Antonio Orlowski. — Krom tio multaj gazetoj rusaj alportas tradukojn el Esperanto aŭ artikolojn pri ĝi de s-oj Šidlovskij el Moskva, Zinoviev el Poltava, Dro Ostrovski el Jalta kaj Poljanski el Ĥabarovsk (Azio). — — El **Trinidad,** insulo sudamerika, venas sciigo, ke s-o G. O. Messerly, laboras en la ĉefurbo Port-of-Spain pri fondo de grupo esperantista.

Pražský denník »**Čas**« přinesl 12. ledna 1904 tuto jistě zajímavou zprávu: »Ministr vojenství pro Esperanto. Francouzský min. vojenství zaslal veliteli 19. armád. sboru v Alžíru dopis: »Dne 18. října 1903 poslal jste mi žádost kapitána Capé, aby se směl súčastniti propagandy ve Francii pro pomocnou řeč Esperanto, vstoupiti do klubů zabývajících se touto propagandou a založiti se svými kolegy u armády podobný klub v Alžíru. Kladu sobě za čest oznámiti Vám, že jsa přízniv rozšíření pomocné řeči světové, dovolil jsem dne 12. listopadu důstojníkům a poddůstojníkům vstupovat do spolku pro šíření Esperanta, jehož sídlo jest ve Vincennes, rue du Levant 6 (u Paříže) a státi se členy různých skupin Esperantistů. Oběžník v brzku sdělí interesentům toto rozhodnutí ve formě úřední.« Kapitán Capé v odůvodnění své žádosti uvedl služby, které Esperanto prokázalo důstojníkům spojených vojsk v Číně i na Koreji. Spolek jím v Alžíru založený získal v 6 týdnech 112 členů; mezi nimi jsou: prefekt a starosta Alžíru, ředitel ústavu Pasteurova, konsulové: rakouský, americký, italský a švýcarský. Tento skvělý výsledek je vzpruhou i pro esperantisty české, kteří započali propagandu za podmínek dosti nepříznivých. Hlavní překážky budou záhy odstraněny a Esperanto získá stoupence také u nás ze všech tříd obecenstva, jako tomu jest v cizině. Informace sdělí ochotně redakce »Čes. Esperantisty«, Bystřice-Hostýn, nebo »Esperantský klub« v Praze, Lazarská ul.«

ORGANIZACIO DE KORESPONDADO (O. K.).

Klarigo de signoj: D = donas. Dez = deziras. K = kolektas. L = legas (en lingvoj . . .). P = parolas. R = respondas. S = skribas.

Unu anonco por ĉiu abonanto de »Č. E.« estas tute senpaga.

---

43. Rusujo. TROICKOSAVSK, Transbajkala prov. — *Nikola, Petrovič Evstifeieff.* *LSP:* rus., pol., malgrand-rus. (ukrain.), angl. franc., mongol., Esper. *LS:* lat., volap., germ. *Dez:* Korespondi pri deveno kaj disvolviĝo de ĉiuj iloj kaj vojoj de societiĝo de homoj dum ekzistado de homa gento (familio, nacio, sekto, partio, mezaĝa metiista korporacio, ordeno, k. t. p.). *R:* Esperante, plej ofte per poŝtkartoj, se eble ilustritaj. — Prepari mian vojaĝon ĉirkaŭ mondo. * 1866.

44. Francujo. LYON, Rhone, Villa Sans Souci, 53, chemin des Pins. — *Albert Offret,* profesoro de mineralogio en universitato. *LSP:* franc., germ., Esper. *Dez:* Korespondi pri mineralogio teoria kaj praktika. Pri minoj kaj aferoj minaj. *D:* Sciigojn pri aferoj minaj. *R:* Per leteroj. * 1857.

45. Rusujo Azia. CHABAROVSK NA AMURU. — *S. Poljanskij,* financa oficisto. *LSP:* rus., Esper. *L:* franc., germ. *Dez:* Korespondi pri kuniĝo de Slavoj en esperanta afero kaj pri propagando de Esperanto. *R:* Laŭ volo de korespondanto. — Mi dezirus, ke esperantistoj ne »plibonigu« Esperanton, ne estu malĝentilaj al kunfratoj kaj penu nur pri disvastigo de Esperanto. * 1863.

46. Aŭstrio, Bohemujo. PRAHA, Klementinum. — *Stanislav Kamarýt,* studento de filozofio. *LSP:* bohem., germ., franc., Esper *LS:* lat. *Dez:* Korespondi pri ĥemio kaj filozofio. *D:* Sciigojn pri bohema industrio kaj komerco. *R:* Per kartoj aŭ leteroj. * 1883.

47. Francujo. BOULOGNE SUR MER (Pas de Calais), rue Wissocq, 26. — *Alfred Michaux,* advokato. *LSP:* franc., lat., angl., Esper. *L:* ital. *Dez:* Korespondi pri leĝoscienco, literaturo, turismo, socialismo. Konatiĝi kun fremdaj leĝistoj, posedi ilian adresaron. — Mi dezirus, ke ĉiuj hotelmastroj en ĉefurboj lernu Esperanton kaj ke oni trovu en hoteloj afiŝojn kun vortoj: »Oni parolas Esperante«. * 1859.

48. Rusujo. JALTA, Taur. gub. — Dro *Ilia Ostrovski,* kuracisto. *LSP:* rus., Esper. *L:* germ. *D:* Mi volonte proponas al ĉiu eksterlanda esperantisto, parolanta Esperante, mian gastamecon. Mi povas gvidi lin en nia urbo kaj doni necesajn informojn. * 1855.

49. Rusujo. SARATOV. Ĥvalina rezerva regimento. — *Konstantin Petrjajevskij,* sub-kapitano. *LSP:* rus., germ., pol., Esper. *Dez:* Korespondi pri esperantista kongreso por ellaborado de internacia sintakso. *R:* Laŭ ebleco. * 1869.

50. Francujo. LA ROCHELLE. — *Sam. Meyer,* ŝipmakleristo. *LSP:* franc., angl., germ., skand., hisp., ital., portug., Esper. *Dez:* Korespondi pri komerco, pri instruado de lingvoj kaj stenografio, pri disvastigo de Esperanto kaj progresado de pacamaj ideoj. — Redaktado de speciala vortaro Esperanta por ŝipistaj esprimoj. * 1862.

Redaktor: Krumpholc Jos. — Vydavatel: Čejka Th.
Tiskem »Družstva knihtiskárny«, Hranice.

ČESKÝ ESPERANTISTA

Monata gazeto por la propagando de Esperanto. Estas eldonata en kajeroj 16-paĝaj.

Nepresitajn manuskriptojn la redakcio redonos, se oni aldonis poŝtan markon por la resendo. — Poŝtaj markoj estas akceptataj nur por $^3/_4$ de ilia valoro.

Represo kaj eĉ traduko de ĉiuj artikoloj estas permesita sub jenaj kondiĉoj: 1. Citi nian gazeton. 2. Sendi al redakcio 3 ekz. de tiu presaĵo, en kiu troviĝas artikoko aŭ traduko.

TELEFONO DE REDAKCIO.

Prvé číslo II. ročníku vydáváme opozdĕně. Všechno úsilí naše nestačilo předejíti tomuto opozdění — námi nezaviněnému. Žádáme tudíž svých odběratelů o prominutí. K dosažení pořádku vydáváme tento sešit o $^1/_2$ silnější než obyčejně a označujeme jej hned i jako č. 2. Druhou půlku č. 2. přidáme k některému z příštích sešitů. Neztratí tudíž naši předplatitelé ničeho.

Nro 1. de II. jaro aperas pli malfrue ol ni intencis, ke ĝi aperu. Ĉiuj penadoj niaj ne povis forigi tiun malfruiĝon — je kiu ni persone ne estas kulpaj. Tial ni petas pardonon de niaj abonantoj. — Por ke ni konservu ordon, ni eldonas tiun ĉi kajeron je $^1/_2$ pli dikan ol ordinare kaj signas ĝin tuj ankaŭ kiel Nro 2. Duan $^1/_2$ de Nro 2. ni aldonos al unu el kajeroj venontaj. Tiel niaj abonantoj perdos tute nenion.

Al s-oj **A. Berbr, Ed. K.** en Z., **Al. Štěp.** en Zdb.: Se eble, volu sendi al ni ankaŭ originalojn. — S-o **Jaroslav J.** en Kr.: Proverbojn ni volus publikigi dulingve. Tial ni petas ankaŭ originalon. — S-oj **J. K.** en Set.: Pri grandaj literoj ni pensas tion saman kiel vi. — **J. T-ý** en Dön.: Viaj proponoj pri ŝanĝoj certe estas bone opiniitaj. Sed tamen ni silentos pri ili, ĉar ni bone komprenas, kiel grava nun estas por Esperanto, ke ni ĉiuj restu kiel eble plej unuformaj — sen gravaj diferencoj. — S-o **V. L-o**, Peterburgo: Se promesita regularo estas preta, volu alsendi. — **Dro A. M. G.**: Kliŝaĵo por portreto de Leonid Andrejev estas preta jam pli longe ol $^1/_2$ da jaro. Nur liberan lokon ni ne trovis ankoraŭ. Kiel vi sukcesis en Peterburgo? Ĉu estus ebla priskribi almenaŭ plej interesajn impresojn? Ni estus tre dankaj! — S-o **Gallois**, Riolunato: Ĉu vi ne scias, ke »Germ. Esp.« ne eliras jam plenan jaron? Tial interŝanĝo neebla. »L' Espérantiste« ankaŭ ni ne ricevas interŝanĝe, kvankam ĉiuj aliaj gazetoj esperantistaj interŝanĝas kun ni. — S-o **L. Michiels**, kanoniko en Malines (Belg.): En imperio Aŭstrio-Hungarujo (kun Bosnio-Hercegovino) oni parolas sekvantajn lingvojn: bohemaan, germanan, hungaran, italan, kroatan, malgrand-rusan, polan, rumanan, serban kaj slovenan (entute 10 lingvojn diversajn!). Nombro da loĝantoj laŭ nacieco estas jena (laŭ statistiko oficiala, 1900): Slavoj — 20,669.449 (t. e. Bohemoj — 7.975.038, Poloj — 4,259.152, Malgrand-Rusoj — 3,805.023, Serbo-Kroatoj — 3.441.156, Slovenoj — 1,192.780), Germanoj — 11,306.120, Hungaroj (Magiaroj) — 8,751.817 (inter ili Ciganoj en nombro 274.940), Romanoj — 3,748.581 (t. e. Rumanoj — 3,021.479, Italoj — 727.102). Krom tio en Bosnio kaj Hercegovino estas 1,568,092 da loĝantoj (en plej granda parto Serboj).

DNEŠNÍ STAV HNUTÍ ESPERANTSKÉHO.

Spolky a kluby esperantistů.

EVROPA.

Anglie: Bournemouth, Dublin, Edinburg, Glasgov, Huddersfield, Keighley, Londýn, Newcastle, Plymouth, Portsmout, Surbiton, Tyneside. — Časopis »The Esperantist.«

Belgie: Antverpy, Bruges, Brusel, Gent, Gilly, Lutich, Louvain, St. Gilles. — Časopis »La Belga Sonorilo.«

Bulharsko: Kazanlyk, Plovdiv, Ruščuk, Silistra, Sofia, Trnovo, Trojan. — Časopis »Rondiranto.«

Francie: Mocný »Francouzský spolek pro propagování Esperanta« má odbory v těchto místech: Agde, Amiens, Annecy, Beaune, Besançon, Bordeaux, Boulogne sur Mer, Calais, Chaumont, Dijon, Epinal, Eu, Grenoble, Hâvre, Lille, Lyon, Marseille, Monaco, Montpellier, Nancy, Nantes, Nice, Paříž, Remeš, Roubaix, Saint-Claude & Oyonnax Saint-Etienne, Saint-Omer, Sceaux, Tarbes, Tournon-Tain, Troyes. — Časopisy: »Lingvo Internacia« (jen Esper.), »Scienca Revuo« (»Vědecká Revue«), jejíž redakční výbor tvoří většinou professoři Pařížské university a pak mnozí učenci zvučných jmen ve vědě (na př. Baudoin de Courtenay, astronom Förster, Deslandres, chemik Haller, Berthelot, mathematik Poincaré, Appel, Duclaux, Becquerel a j.), »L'Espérantiste« a »Espero Katolika.«

Hollandsko: Amsterdam. — Časopis »La Holanda Pioniro.«

Italie: »Italský spolek pro propag. Esperanta« s odbory v místech: Neapol, Riolunato u Modeny a Turin. »Spolek Sicilských Esperantistů« v Palermu. — Časopis „L'Esperantista."

Německo: Berlín, Mnichov.

Rakousko-Uhersko: Brno („Spolek Esperantistů", Frant. Jos. tř. 102. Spolkové místnosti: Zelný trh, č. 24.), Praha („Klub Esperantistů", Lazarská ul., kavárna „Tůmova"). Tvořící se skupiny esperantistů v Hrádku, Plzni, Prostějově, Strakonicích, Teplicích u Mostu a Uh. Hradišti. — V Budapešti je „Sdružení uherských esperantistů." — Časopis „Český Esperantista."

Rusko: Ústřední spolek „Espero", se sídlem v Petrohradě. Jeho odbočky: Archangelsk, Charkov, Jalta, Melitopol, Moskva, Narva, Oděsa, Poltava, Smolensk.

Španělsko: „Španělský spolek pro propag. Esperanta" s odbory v místech: Logroño, Murcie, Valencie. — Časopis „La Suno Hispana."

Švédsko: Štokholm, Södertelge.

Švýcarsko: „Spolek Švýcarských Esperantistů" s odbory ve Friburgu, Lausanne, Nyonu, Rolle a Ženevě. — Časopisy „La Svisa Espero" a „La Juna Esperantisto."

AFRIKA.

Alžírsko: V městě Alžíru je velmi četný odbor „Francouzského spolku pro propag. Esp."

AMERIKA.

Chile: „Chilský spolek Esperantistů" v Santiago. — Časopis „Ĉilio Esperantista."

Kanada: Montreal (také velmi četný klub ženský), St. Hyacinthe. — Časopis „La Lumo" (francouzsko-anglicko-esperantský).

Mexiko: Nogales.

Peru: „Peruánský spolek Esperantistů" v Limě. — Časopis „Antaŭen Esperantistoj!"

Trinidad: Port of Spain.

ASIE.

Ruský ústřední spolek „Espero" má odbočky v místech: Chabarovsk na Amuru, Tomsk, Urga a Vladivostok.